


47a Konferenco de ILEI en Montevideo

Jen la nacia parlamentejo de Urugvajo, kie okazis la solena inaŭguro de la konferenco.



Dereta foto.



Aliaj fotoj ĉi-paĝe: Marija Belošević

Dekstre la salonego, kie en 1954 okazis la komenco kaj fina asembleo de la Ĝenerala Kunsido de Unesko en novembro-decembro 1954, fotita el pli supra etaĝo. La kvin-kolora marmoro por la kolonoj kaj plio devenis el Urugvajo, la palacon oni ekkonstruis en 1908 laŭ gvido de arĥitekto el Italio.



La inaŭguro okazis en simile impona sed pli konvena ĉambro tuj apud la fama salono el 1954, kiu situas meze inter tio kaj la ĉambro de la deputitoj. En 1954, la drameca ŝanĝo de sinteno inter la unua malsukcesa prezento de la rezolucio kaj la lasttaga triumfo ŝuldiĝas al intensa gazetara kampanjo kaj sennombraj 'koridoraj paroloj'. Facile imageblas, ke Lapenna kaj la loka teamo eĉ en ĉi tiu salono lobiis intense kun delegacio post delegacio por stiri ilin al pozitiva voĉdono.

Dekstre: La direktorino de la Unesko-oficejo en Montevideo, kun kolego. Sube, Mirejo Grosjean dankas al la urbeŝtrino de Montevideo.





La urbestrino, s-ino Ana Olivera, salutas nin kaj bonvenigas nin al la 1.4 milionpersona ĉefurbo de Urugvajo.

Foto: François Lo Jacomo.



Supre, maldekstre: La prezidantino de ILEI skribas en la parlamenta memorlibro.
Supre: Konferencanoj sur la balkono en salono 1954.
Maldekstre: Konferencanoj ricevis gvidatan ekskurson tra la parlamentejo; jen meze de salono 1954.

Ĉiuj pliaj fotoj ĉi-paĝe: Marija Belošević



Plafono de parto
de salono 1954



Mirejo Grosjean kaj François Lo Jacomo (unu el la multjaraj reprezentantoj de ILEI ĉe Unesko, unuavice en Parizo) kun s-ino Lidia Brito, la direktorino de la regiona oficejo de Unesko en Montevideo.

Arbo-plantado

Ĉiuj fotoj de la arbo-plantado: Marija Belošević.

ILEI-anoj survoje por planti la memorarbo.



Mirejo kun la ekologa paro, kiuj kreskigis la plantitan guavarbeton el semo. Videblas la ŝildo antaŭ la arbo, kiun vidis multaj preterpasantoj de la apuda trotuaro.



Ankaŭ UEA laboras por kreskigo: ĝia vic-prezidanto efektive vicumis kun multaj aliaj ŝovelemuloj por aldoni asocian kontribuon al la kolektiva plantado.

